# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 59, Numero 4, oktobro 2024*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**

**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Raporto de la prezidanto, Esperanto-Federacio de NSK

*Jonathan Cooper*

Prezentite ĉe la Jarkunveno la 7an de septembro 2024

**Membraro**

Ekde la komenco de julio 2023, ni bonvenigis 17 novajn membrojn: Monika Agarwal, Gwen Chan, Eszter Coombs, Elsa Cooper, Rory Coverdale, Karim De-Lancel, Minh Thong Do (Tom), Dominic England, John Grant, Amy Hong, Melody (Eraro) Hooper, David Ludeke, Jack McMahon, Imogen Marosz, Chunliang Mu, Steve Ripley kaj Nicole Stevens.
Kvin membroj de 2023 ne renoviĝis. Nuna nombro da membroj: 40

**Esperanto-kursoj**

Du kursoj por membroj estis organizitaj. Kvankam ili estis okazigitaj ĉe Esperanto-Domo (kaj studantoj estis kuraĝigitaj ĉeesti persone), ĉiam ekzistis la eblo partopreni per Zoom.

**Komencantoj, kun Adam Levy**

Tio estis deksemajna kurso (unu horo semajne), kiu komenciĝis dimanĉon, la 21an de aprilo 2024, je 17:00. Estis proksimume 3 studentoj persone ĉiun semajnon, plus 5 rete.

**Post-komencantoj, kun Joanne Cho**

Tio estis ses-semajna kurso (du horoj semajne), kiu komenciĝis dimanĉon, la 14-an de julio 2024, je 16:00. Ĉeestis proksimume 7 studentoj persone ĉiun semajnon, plus 7 rete.

**Konstruaĵoj**

**Trovi novan luanton por la konstruaĵo ĉe 138 Little Eveleigh Street**

Bedaŭrinde, Key College (sendependa lernejo, menciita ĉe la lasta jarkunveno) sciigis nin la 15an de marto 2024, ke ili ne povos kompletigi la aranĝojn por lui la konstruaĵon, pro la alta kosto de ekipado de ĝi al siaj specifaj bezonoj. La posedanto de loka privata galerio ankaŭ esprimis intereson, sed fine malakceptis, dirante ke la lupago, kiun ni petis, estas tro alta por ili. Enketoj estis faritaj kun komerca nemoveblaĵo-agento, sed mezvoje tra intertraktadoj, ili anoncis, ke ili nur ofertas ekskluzivajn kontraktojn, tio signifas, ke ni devus pagi al ili elcenton de la monata luo eĉ se la luanto venos rekte al ni. Nuntempe, la konstruaĵo (oficiale, nur la malantaŭa kvarono) estas luata kiel la ateliero de skulptisto, por $1000 monate.

**Riparoj al la konstruaĵo ĉe 138 Little Eveleigh Street**

Post kiam la liko ĉe la orienta muro estis riparita (per anstataŭigo de la defluilo), liko aperis sur la okcidenta muro. Malgraŭ multaj provoj ripari la problemon, ni ankoraŭ ne povis fari ĝin. La rulpordo estis motorigita, kaj nova akso instalita en oktobro 2023. La muroj estis purigitaj (kun altprema akvo) kaj farbitaj en januaro 2024.

**Korto**
La korto ekster la kuirejo estis plibeligita, per la instalado de nova krada ekrano kaj potplantoj.

**Luado de Esperanto-Domo**
Privata grupo ("Prime Time") nun luas Esperanto-Domon ĉiun vendredon, por ludvesperoj, por $100 semajne, sub la superrigardo de Dmitry Lushnikov.

**Biblioteko**
Fazoj 1 kaj 2 de la kataloga projekto nun estas kompletaj. Ĉiuj libroj kaj kolektoj de periodaĵoj (krom kelkaj aŭdvidaj eroj) estis katalogitaj. La tria fazo implikas starigi komputilsistemon por ke membroj povu rezervi erojn kaj registri kiam eroj estas pruntitaj kaj remetitaj. La katalogo estas rigardebla rete kiel kalkultabelo ĉe bit.ly/biblioteko-katalogo .

**Gastĉambro**
Dek tri homoj uzis la gastĉambron dum 154 tagoj dum la financa jaro 2023-24.

**Zamenhof-tago**
La ĉiujara festotago de Zamenhof okazis en Esperanto-Domo dimanĉon, la 17an de decembro 2023. Jonathan Cooper gvidis ludon, "Divenu la vorton", Nicole Else gvidis ludon, "Ĉu mi mensogas?", Dmitry faris prelegon pri sia lastatempa vojaĝo ĉirkaŭ Aŭstralio, kaj Rainer Kurz prelegis pri "Bela Stutgarto".

**Telopeo**
Ok numeroj de la Federacia e-bulteno, Telopeo, estis publikigitaj en la financa jaro 2023-24.

**Lingvaj festivaloj**
Du sukcesaj lingvaj festivaloj okazis en junio 2024, unu ĉe Burwood (22an de junio) kaj unu ĉe la Ŝtata Biblioteko de NSW (23an de junio). Ĉiu havis eron pri Esperanto.

**Proponita strategia plano**
La estraro nuntempe diskutas ideojn por:

- Pliigi la nombron da membroj
- Pligrandigi la nombron da eventoj ĉe Esperanto-Domo (kaj virtuale)
- Altiri pli da vizitantoj al Esperanto-Domo
- Diskonigi Esperanton en kaj ekster Sidnejo
- Havi pli da servoj por membroj kaj aliaj esperantistoj

Ideoj inkluzivas:

- Plibonigi la retejon por pli bone klarigi kialojn por aliĝi aŭ lerni Esperanton
- Dungi laboriston por regule prizorgi Esperanto-Domon
- Starigi ian Esperanto-kafejon

La diskutdokumento estas legebla ĉe bit.ly/strategia-plano

## Protokolo de la jarkunveno 2024

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

Sabaton la 7an de septembro je la 11a horo matene en Esperanto Domo, 143 Lawson Street, Redfern
**Ĉeestis:**
**Prezidanto**: Jonathan Cooper
**Vicprezidanto**: Dmitry Lushnikov
**Sekretario**: Nicole Else
**Kasisto**: Alan Turvey
**Estraranoj**: Adam Levy, Terry Manley (per zoom)
**Membroj**: Mark Rodowicz, Wanda Cooper, Kyung-Mi Cho (per zoom), Chunliang Mu, Karim De-lancel
**Pardonpetoj:** Rainer Kurz, Greg Cooper, Martin Gray, Jurgen Barth, Amy Hong

Ni agnoskas, ke la kunveno okazas sur la tradicia grundo de la aborigena popolo.

**Protokolo**
Jonathan proponis, ke ni akceptu la protokolon de la pasinta jaro, Dmitry subtenis. Akceptite.

**Raporto de la prezidanto**
Jonathan Cooper prezentis la prezidantan raporton (vidu la aldonaĵon). Dmitry proponis, ke la raporto estu akceptita. Alan subtenis. Akceptite.


**Raporto de la kasisto**
Alan prezentis la financan raporton (vidu la aldonaĵon). Jonathan proponis, ke la raporto estu akceptita. Adam subtenis. Akceptite.
Adam Levy demisiis kiel estrarano. Ni dankis lin pro lia laboro kiel estrarano kaj pro la instruado de la klasopor komencantoj.

**Speciala rezolucio**
Alan proponis ke Jonathan Cooper, Alan Turvey, Nicole Else kaj Dmitry Lushnikov povu esti reelektitaj kiel estraranoj. Dmitry subtenis. Akceptite.

**Elekto de estraranoj:**
Ni ricevis du mandatojn de Rainer Kurz kaj Jurgen Barth.
La sekvaj membroj estis reelektitaj:
Jonathan Cooper
Dmitry Lushnikov
Nicole Else
Alan Turvey
Terry Manley
3 novaj estraranoj estis elektitaj:
Kyung-Mi Cho (Joanne)
Greg Cooper
Mark Rodowicz
La prezidanto dankis la partoprenantojn. La kunveno finiĝis je la 11:45.

## Esperanto-kurso por post-komencantoj

*Dmitry Lushnikov*



Esperanto NSW ĝojas anonci, ke ni aranĝas novan 10-semajnan Esperanto-kurson por post-komencantoj. La instruisto estos la mondfama Esperanto-aŭtoro, Trevor Steele el Adelaido. La kurso donos al vi oportunon plibonigi vian fluecon kaj memfidon pri la lingvo.

La kurso komenciĝos sabaton la 5-an de oktobro 2024 je 12:00 per Zoom, kaj ankaŭ ĉe Esperanto-Domo. Estrarano de Esperanto NSW helpos vin komuniki kun la instruisto.

Ĝi estas senpaga por membroj. Se vi ne estas membro, ĝi kostas nur $15:
esperantohouse.org.au/about-us/join

Por registriĝi (kaj ricevi la Zoom-ligilon), bv., sendi mesaĝon al Dmitry (dimlush@gmail.com).

EFNSW: Esperanto Domo
Kontaktu Jonathan Cooper: 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm;  Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320  *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Joanne Cho |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Dmitry Luŝnikov, Terry Manley, Greg Cooper, Mark Rodowicz |

